

INTERNACIA SOCIA REVUO

MONATA ESPERANTA GAZETO, INTERNACIE REDAKTATA
:- PRI ĈIO, KIO INTERESAS LA HOMARAN VIVADON. :-

Sendu ĉion, kio rilatas al la
Redakcio kaj Administracio al
W. NUTTERS, Ostadestraat 94,
Amsterdam, Nederlando. :- :-

ABONO: jare 1 Sm. (holande:
1 gulden 20 cent), duonjare $\frac{1}{2}$
Sm. Helpabono: jare almenau
2 Sm. Konto ĉe la Ĉebanko. :-

August Bebel †

13an de Aŭgusto mortis en sanatorio en Passug, Svisujo,
August Bebel, je aĝo de 73 jaroj.

„La kruela sorto”, skribis germana soc.-dem. ĉeforgano „Vorwärts”, „ree faligis unu el niaj plej fortaj kaj plej talentaj batalantoj, viron, kiu depost la komenco de la socialista movado en Germanujo staris je la pinto de tiu movado kun neſancelanta fideleco, kun nerenvorsebla forto, viron, kiu en sia persono korpigis la plej bonan en nia movado — nia maljuna gvidanto August Bebel mortis.

„Neniu el la soc.-dem. gvidantoj”, daŭrigas „Vorwärts”, „jam gajnis, en la sama mezuro kiel Bebel, la koron de l’ amaso. En tiu viro kun lia arda temperamento, la proletariaro vidis sian propran Mion. En Bebel ĝi vidis viron, kiu per ĉiuj fibroj de sia koro estis ligita al proletariaro batalanta. Neniu el la antaŭuloj de l’ germana socialismo havis tiom da influo sur la germana proletariaro — nek eĉ Marx, aŭ Engels, aŭ Lassalle. Tiuj ja devenis el alia mondo, sed Bebel estis produktajo de l’ proletariaro mem; en li ĝi vidis, unuiĝintaj kaj obligintaj ĝis pli alta potenco: ĉiujn bonajn ecojn de l’ supren-celanta laboristklaso”.

„Humanité”, pariza organo soc.-dem., skribis: „Internacia socialismo funebras pro la morto de unu el siaj plej bonaj homoj. La sciigo de l’ morto de l’ fama maljunulo vekigos malĝojajn resonojn ĉie, kie estas sur la tero proletarioj, laborantaj por sia socia liberigo”.

En „Le Peuple”, belga ĉeforgano social-demokrata, skribas Vandervelde: „Ne nur la partio germana, sed la tuta internacia social-demokracio perdas en li la plej bonan el siaj

filoj. En nomo de Intern. Oficejo Socialista mi sendas al ĉiuj, kiuj ploras August Bebel, la aserton de nia simpatio kaj de niaj frataj sentoj".

El holanda organo „Popolo”: „La simpleco kaj sincereco de Bebel admirinde harmonias kun la karaktero de l' germana soc. movado, kiu estas, eble pli ol iu alia parto de l' Internacio, pure proletaria movado. En la klasbatalado li ĉiam propagis aplikon de ordinara, tuj eblaj rimedoj. Tial li estis komprenata de la laboristoj; kion li konsilis, tio neniam iris ekster aŭ super ilia spirita vidosfero, nek superiris iliajn materialajn fortojn; kontraŭe, ĝi ĉiam pruviĝis farebla, kaj ĝi ordinare pruviĝis enhavi la ĝermon de l' venko. Ĉio ĉi havigis Bebel ne nur la amon kaj admirion de l' amaso, sed ankaŭ ĝian senliman konsidon. Oni sciis, ke la konsilo de Bebel estis la plej bona, kiun iu povus doni. Tamen, Bebel neniam sin kredis neerarebla; ofte li malkaše konfesis erarojn. Sed tiu honesteco ne malfortigis, ĝi plifortigis ankorau la aŭtoritataton de lia vorto. Oni havis konvinkon, ke neniam pro propra prestiĝo li persistus en opinio aŭ konsilo de li donita. Lia celado direktis sin nešanĝe al altaj celoj. Sed li volis, same kiel tion volas proletariaro mem, ne nur admirri kaj adori la idealon, sed super tio ĝin atingi, ĝin efektivigi. La burĝa idealismo kun ĝia malplaĉo al politiko kaj ĝia kredo ke por politika rolo certaj malvirtoj estas nepre necesaj, neniel similis la idealismon de Bebel.... Li kreis antaŭ 1878 la germanan socialismon, dum la sekvantaj 12 jaroj li ĝin savis de pereo, poste li laboris al ĝia vastigo kaj ĝia fiksigo — kaj dume li estis neniam superkuraĝa kaj neniam senkuraĝa, ĉiam principa kaj neniam dogmema, restante fidela al si mem kaj al la partio en prospero kaj en malprospero, restante la nešancela batalanto, kiu pro la morgaŭo ne malprizorgas la hodiauon, sed tamen faras la agadon de hodiaŭ tiel, ke ĝi portas fruktojn ankaŭ por morgaŭ. Kelkfoje, sed malprave, oni nomas Bebel la „reĝo” de germana socialismo. Li neniam puvis antaŭen sin mem; la lokon, kiu li okupis, li plenigis pro siaj talentoj kaj pro la fido de l' germana proletariaro. Kaj li atingis rezultojn, kiuj povas suferi lian foriron; germana socialismo ne staras aŭ falas kun persono, kiu ajn. Bebel mortis — la movado vivados. Jen la karakterizo de bonaj gvidantoj — ili post-lasas laboron, kiu ne plu bezonas ilin.”

El berlina burĝa gazeto: „La elektra efiko de l' nomo Bebel tute ne malfortigis pro la nelibervola halto de lia

agado de agitanto. La socialista amaso inklinis kun arda amo al tiu varmsanga viro, kiu en siaj bonaj tagoj disponis je brilanta elokvento. Lia nomo restos daŭre kunligita kun la historio de Germanujo”.

El burĝa „Vossische Zeitung”: „Bebel ne estis teoriisto, sed „Draufgänger” (ĉiam malpaciena por ataki kaj senkompe bati la kontraŭulon), kiu kuntrenis la popolamasojn per sia temperamento. En sia partio li estis la esprimita reprezentanto de l' revolucia taktiko; lia plej ega kontraŭulo estis Von Vollmar, la gvidanto de l' bavaraj soc.-dem., kiu antaŭ ĉio, eĉ per kunlaboro en la nuna ŝtato, volis akiri profitojn por la laboristoj, anstataŭ satigi ilin per la ĝojoj de estonta Feliĉujo”.

Bebel neniam akceptis funkcion salajratan en la soc.-dem. partio. Lia posedajo konsistas el postlasajo de austria oficiro, kiu, pro admirio por Bebel, kiun li tamen ne konis persone, nomis lin sia universala heredonto. Bebel devis procesi kun la parencoj de l' oficiro, por tiu heredajo; li gajnis la proceson, donacis al la parencoj parton el la heredajo kaj donacis alian parton al la partio-kaso, kiu nun ricevos ankaŭ preskaŭ ĉion, kio restas.

Bebel entute pasigis 6 jarojn en malliberejo.

Dimanĉon la 17an, la kadavro de Bebel estas brulita en Zürich'a krematorio. Granda procesio akompanis la mortinton al tiu loko. Antaŭ la enirejo la amaso ĉirkaŭis la ĉerkon, kaj la naciaj reprezentantoj prenis la vorton por lasta saluto.

Unue Molkenbuhr, por la germana partio, due Fischer, por la soc. grupo en germana parlamento, trie Legien por la germana metiomovado, kvare Grünwald por la distrikto Hamburg I (kiu mandatis Bebel).

Poste parolis grandaĝa Greulich por svisa kaj rumana partioj: „La morto, li diris i. a., estas sama por ni ĉiuj, sed tio, kio antaŭiras al morto, ne estas sama ĉe ĉiuj. Certe, 50 jaroj estas kompare al eterneco nur ono de sekundo, sed, sur la tero, duoncentjaro de ega laboro povas esti granda beno. Sian lastan publikan paroladon, antaŭ kelkaj monatoj, Bebel finis per fortaj: Antaŭen! Kaj nun, li returnos al nekonscia naturo, sendolore ekdorminte post vivo belega! Mi finos ĉe tiu ĉerko per arda: Antaŭen!

Sekvis Vandervelde por Belgujo, kaj Klara Zetkin por la proletariaj virinoj. Si diris i. a.: „La tutu socialista movado inter la proletariaj virinoj dankas sian ekziston al tiu ĉi viro.

Li estis la unua apostolo de socialismo inter la virinoj. Kaj almenaŭ tion oni ne povas atribui al deziro al niaj voĉoj — ĉar ni ne havas voĉrajton, nek influon, nek ion. Kiu sin levis por ni, tiun atendis en la komenco nur mokoj kaj insultoj. Sed, li faris ĝin, kaj li lernigis nin, ke la liberigo de l' virino nur estas en socialismo".

Sekvis Viktor Adler por Aŭstrio, Hungarujo, Pollando, Serbujo: „Estas terure, estas nesufereble, estas kordissirante, ne havi lin plu. Lia rigardo estis konsolo, lia manpremo donis forton. Lia vivo estis por imiti ĝin, lia morto por envii ĝin. La popolo marĝadas al la lando promesita, sed li ne vidos ĝin. La rigardo estas for, la mano estas for, ni ne havas lin plu!"

Post Bracke por Francujo kaj Keir Hardie por la Angloj, adiaŭis Anĝelika Balabanov la mortinton por Italuj. La pasiaj vortoj kaj la arda entuziasmo de tiu ĉi virino vekis, laŭ la raportoj, profundan emocion. Sekvis Plehanov por la soc. dem. de Rusujo, Hilquitt por la Amerikanoj, Stauning por Danujo, kaj, fine, Troelstra por Holandujo: „Nederlanda soc. dem. sendas per mi al mortinto lastan saluton. Por la proletarioj de Nederlando fariĝis la nomo de Bebel standardo en la klasbatalado, signo flamanta de l' venanta triumfo. Lian korpon ni postlasas en la fajro, sed la torĉon de lia entuziasmo ni kunportas en la vivon. La korpo disfalas en cindrojn, sed la fajra animo brilados en la koro de nia klaso."

Kiamaniere esperantistigi la laboristarordon?

„... tiel strange
La homa geno estas konstruita".

Ŝajnas, ke la dudeka jarcento estos la jarcento de l' internacieco. La homoj ekkomencis honti pri sia malŝato de ĉio, kio ne devenis de ilia naskiĝlando. Pli larĝan elrigardon sur la mondon ili al si alprenas, kaj la vidajo ilin surprizas. Ili vidas, ke arbitraj landlimoj devus esti nenia kaŭzo de malpaco aŭ arrogantaj pensoj; ke iliaj proksimuloj ĉe la alia flanko de la landlimo estas homoj, kiel ili mem, la pli multo laboranta sammaniere por akiri al si iom da necesajo por la ĉiutaga vivo. Do, la elrigardon al la mondo, de la nacia vidpunkto, ili trovas tro mallarĝa, tro malprofunda.

Sed estas malfacile renversi la kutimojn de centjaroj, aŭ venki la malbonajn ideojn, kiujn la popoloj jam antau longe portis kontraŭ siaj fratoj en aliaj landoj. La edukado ne

sufiĉas por tio. Certe, inter la jam konvinkituloj estas profesoroj, kuracistoj, legistoj, instruistoj, kaj multaj aliaj kleruloj. Sed eĉ ĝis la fino de la deknaŭa jarcento ŝajnis, ke la civilizacio rajtigas naciojn forpreni de la nacioj aŭ gentoj necivilizitaj pecegoj da tero, aŭ instigas ruze aĉeti komercajn por senvvaloraj vitroglobetoj aŭ multkolorita ŝtofo. Tamen, en la deknaŭa jarcento estis sufiĉe da bonedukitaj homoj en ĉiuj civilizitaj landoj, kiuj, se ili volus, povus efektivigi amikecon inter eĉ tiuj nacioj, kiuj kontraŭbatalis. Sed la sperto montris, ke la plej danĝeraj ŝovinistoj estas tiuj, kiuj ĝuste pro tia edukado pretendis juste instigi la homojn al la milito, kaj kiuj, tiamaniere, arogis al si la rajton difini la destinojn de la nacioj.

Nun „en la mondon venis nova sento" de l' frateco, de l' internacieco. Estas koincida fakteto, ke la nova sento ekaperis ĝuste, kiam sur la mondo ekfloris la nova lingvo Esperanto, kun sia interna ideo de la Esperantismo. Eĉ se ni ne povas ĝuste montri, ke la Esperantismo rekte influis sur la proponojn pri „les ententes cordiales", ni rajtigas pensi, ke la disvastiĝo de la Esperantismo tra la landoj kaj nacioj sendube havis efikon sur la reciprokan sinkomprenciĝon; ke, fakte, pere de Esperanto, la nacioj nun pli bone sin reciproke estimas.

Kvankam estas vero, ke la edukado ne estas sufiĉa helpilo por internacia paco, estas ankaŭ vere, ke en multaj landoj la laboristoj, kiuj ne havas multe da oportunaj okazoj por kleriĝi, ankoraŭ ne komprenas la utilon kaj la benon, kiujn alportas al ili la nova sento en sia esperantisma vesto. Kiu la plej multe gajnus, se la civilizita mondo fariĝus unu granda ronda familio? Ĉu la kleruloj, la riĉuloj aŭ la laboristoj? Senhezite, mi diras, la laboristoj. Certe, ofte okazas, ke la laboristoj estas kleruloj, malpli ofte ili estas riĉuloj. Sed, kiel diversaj klasoj oni povas apartigi ilin. Pro sia grandnombreco, rilate la aliajn klasojn, la laboristoj estas la fundamento de ĉiuj armeoj. Sur ili do falas pli peze la mortoj, la vundoj, la perdoj de l' bataloj. Sur ilin ankaŭ pli peze falas la funebroj, ĉar malsimile al la riĉuloj aŭ kleruloj, ili ne havas la rimedojn havigi la necesajojn de l' vivo, post kiam la patro aŭ frato mortas pro la milito. Tiuj ĉi estas la rektaj konsekvencoj al ili, pro la sovaĝaj militoj, kiuj ofte okazas eĉ inter civilizitaj nacioj. Sed la nerektaj konsekvencoj estas eĉ pli disvastigitaj ol tiuj ĉi, kiuj koncernas, ordinare, nur la familianojn funebrigitajn. La aliaj

trafas la tutan popolon, tial, pli multe la laboristaron. Pro milito, la registro dejas havigi pli da impostoj. La komerco suferas; preskaŭ ĉiu metio suferas; oni havas maipli da mono por necesajoj; kaj trafas eĉ la landon, kiu sukcese batalis, grava mona krizo. En ĉio tio la laboristoj suferas pli ol aliaj. Ŝajnas do, ke oportunas por ili la Paco Movado. Nur la Paco povas garantii, ke ili senhalte laboru ĉe siaj metioj; nur la Paco Interkonsentigo povas savi al la famili-anoj la paĉojn kaj filĉojn alie altiritajn al kruela milita ŝanco de morto aŭ vundo. Do, la laboristoj rigardu al la Paco Movado. Ili vidos, ke la Esperantistoj jam donis grandan forton al tiu propono. La plej agemaj, entuziasmaj kaj daŭre laborantaj propagandistoj por tiu celo estas la Esperantistoj. Kaj, kvankam tiu movado signifas la pacon inter la homoj, la Esperantismo signifas ion plu: la fratiĝon de l' homaro. Do, se la celadon al la paco devus subteni la laboristoj, multe pli devus ili aliĝi al, kaj helpi al, la Esperantistoj kaj la Esperantismo.

Mirinde estas, ke la laboristoj ne tute bone komprenas la internaciecon de la Esperantismo, kvankam jam de longe ili celis la internaciigon de la metioj. Ĉe la kunveno de la Arbeiterbund ĉe Olten en Novembro 1880, oni aranĝis starigi Generalan Metiuniĝon, kaj permisi al anoj de iu ajn nacio aliĝi, „car la bazo de la industria demando estas internacia”. Ĉe la internacia konferenco en Paris, la 29an de Octobre 1883, oni diskutis, kiel prepari sistemon de internacia legdono, kaj kiel starigi konstantan internacian unuiĝon inter la laboristaj unuiĝoj, en ĉiuj industriaj ŝtatoj, „por ke la laboristoj ĉie havu tolerablan ekzistadon”. En Halle oni decidis konsili al la socialista kongreso (1883) diskuti la internaciigon de la metiuniĝa movado. Karl Marx konsilis al la komunistoj labori ĉie por la unuiĝo kaj interkomprenejo de ĉiuj demokrataj partioj en ĉiuj landoj. Ĉe la nacia kongreso en Paris (1883), oni konsentis, principe, ke la laboristoj ĝuu la plej bonan liberecon eliri el unu lando en alian; sekve ke ĉiuj leĝoj, kiuj tion malpermesas, estu forigataj. Mi citu, fine, ke la Cercle Internationale estis starigita en Paris en 1882, por organizi internaciajn amikajn interrilatojn inter la socialistoj de ĉiuj nacioj.

Mi ne citas tiujn faktojn pro simpatio aŭ por aŭ kontraŭ Socialismo, aŭ por aŭ kontraŭ ia ajn aspekto de la laborista movado; sed nur por montri, ke la laboristaro jam multfoje celis la internaciecon de sia movado. Ĝi vidas, ke pro tiu unuiĝo oni povos tuj internaciigi la industrian movadon, kaj

sukcesigi la rezultatojn. Sed, ĝis nune, la penoj internaciigi ne grave sukcesis, kaj ili ne grave sukcesos sen lingva komprenigilo inter tiuj, kiuj parolas diversajn lingvojn. Tiu opinio praviĝis pro la malgranda sukceso de la internaciiga movado de la lastaj 30 jaroj. Sed la interkomprenigilo kuŝas ĉe la manoj de la laboristaro. Kial ĝi ne grandnombre ĝin uzis? Tiu problemo staras antaŭ la propagandistoj en ĉiuj landoj.

Eble, la propagandistoj esperantistaj tro multe priparolis la lingvan flankon de la afero; anstataŭ, antaŭ ĉio, elmontri la esperantisman celon. Lingva klereco neniam helpos al nia movado inter la laboristaro. Sed komprenigu al ĝi, ke la esperantismo celas la fratiĝon de l' homaro: ke, pro tio, por la unua fojo, ĉiu homo povas facile amikiĝi kun siaj najbaroj trans la land- aŭ marlimoj; komprenigu al ĝi, ke ĉiu esperantismano dediĉas sian tempon kaj monon por helpi al la homa bono, kaj estimas ĉiujn homojn, kiel gefratojn; komprenigu ĉion tion, kaj baldaŭ ni havos pli seriozan, pli gravan movadon en Esperantujon ol iam antaŭe ni vidis.

Kiom da niaj gefratoj sentas, kun Ifigenio, ke

„Libere spiri ne estas vivi”

aŭ eĉ, kun Oresto, ke

„... tuta la mizero
Finiĝos nun kun mia vivo kune”.

Ne la Esperantismo la mondona regas. Ne la Esperantismo instigas al iuj subpremi la aliajn. Do, nia devo estas propagandi la esperantismon inter ĉiuj, sed precipite inter la laboristojn. Ĝin propagandante ni propagandas Esperanton. Sed, celante propagandi nur Esperanton, vi eble maltrafas la Esperantismon; certe vi maltrafas grandnombran la laboristojn. En siaj koroj la laboristoj sentas la fratecon de l' homaro. Sed, pro diverseco de lingvoj, la fratiĝo antaŭe mankis. Nun, komprenigu al ili, ke neniam antaŭe ili havis tiel bonan rimedon kontraŭ la malfacilajoj de la vivo. Ni diru al ĉiu laboristo

„Espero nova nun por vi eklumis”,

kaj montru, ke tio plenumiĝos pere de la esperantismo. Tiamaniere, vi helpos ankaŭ al la esperantismo, t. e. la frateco de l' homaro, kaj al nia kara lingvo.

Ni diru: Per la Esperantismo vi fratiĝos kun la homoj alilandaj, kaj la homaro fratiĝos kun vi. Vi pli bone konos

iliajn suferojn aŭ felicōn. Do, vi pli simpatios al ili, ĉar vi pli bone komprenos ilin, kaj pli multe volos helpi al ili. Tiuj sentoj fariĝos reciprokaj, ĉar

..... Felico, kiel princo,
Kun bela sekventaro ĉiam maršas".

Per Esperanto vi konatiĝos kun ilia lando, iliaj verkistoj, ilia ĉiutaga vivo kaj iliaj pensoj. En la scienco unua, la studado al la homoj mem, vi plilertiĝos, ĉar neniu lando enhavas la tutan saĝecon de la mondo. Ne plu vi estos nur ano de tiu ĉi aŭ alia nacio; ne plu vi rigardos al la homoj alilandaj, kiel al malamikoj, triponoj aŭ sensenculoj; sed vi eniros la grandan rondon familialan, kies celoj estas la amo kaj la paco, kaj kies parolo estas la

..... dolca voĉo; agrablega sono
De l' hejma lingvo en la fremda lando".

Edinburgo.

JAMES ROBBIE.

Pelata ekster la „rondon familialan”.

Sub tiu ĉi rubriko en Aŭgusta no. paĝo 197, aperis artikolo rilatanta la sintenon de iu burĝa esperantista societo pri „Liberiga Stelo” (Asocio Internacia de la progresemaj Esperantistoj, fondita en 1906 per la kunigo de Paco Libereco kaj Esperantista Laboristaro).

En tiu ĉi artikolo oni citas la jenajn parolojn: „Se li estis en „Liberiga Stelo”, li do estas anarkiisto” diris la viceprezidanto.

„Certe, li estas anarkiisto” opinis alia grava membro de nia grupo.

Tio estas malinda mensogo, destinata kredigi ke „Liberiga Stelo” estas anarkiista asocio. Ne estas la vero! Mi pruvas mian aserton per la unua artikolo de nia regularo. Jen:

Artikolo 1a. Estas fondita sub la titolo: Internacia Asocio „Liberiga Stelo”, esperantista unuiĝo celanta:

1e. Batali per presajoj (libroj, broshuroj, revuoj, k.t.p.) kontraŭ la militarismo, la religioj, ĉiuj dogmoj kaj antaŭjuĝoj, por la malstarigo de la kapitalisma socio;

2e. Disvastigi la lingvon internacian Esperanto, kreitan de Doktoro Zamenhof, ĉe ĉiuj internaciistoj, kooperativistoj, sindikatistoj, socialistoj kaj anarkiistoj, ĉu organizante kursojn, ĉu alimaniere;

3e. Propagandi la liberigajn ideojn ĉe la Esperantistaro;
4e. Helpi al la rilatoj inter la neesperantistaj laborismaj sindikatoj ĉiulandaj, kiel interpretisto por ilia korespondado.

Oni vidas klare ke „Liberiga Stelo” kiel I.S.R. grupas ciuspecajn progresemulojn.

La kialo donita por kio oni rifuzis la abonon je I.S.R. kaj ekceptis tiun por „Katalika Esperantisto”, pruvas evidente ke ĉe la grupo de la kamarado M. Kraft la estraro havas burĝan menson, malgrandan intelekton.

Ankaŭ mi samopinias kiel Kraft: Ni devas aranĝi ĉie niajn sendependajn grupojn kaj kursojn. Ni tion faris de du jaroj en Sotteville-les-Rouen kaj niaj lernantoj (ĉiuj anoj de Liberiga Stelo”) uzas Esperanton nur por laborista emancipanta celo.

Ke en ĉiu urbo kuraĝa kamarado faru same kaj tiam laboristaro povos venki burĝaron kaj kapitalistaron.

F. M. STRUB, sekretario de „L. S.”
en Sotteville les-Rouen, Franclando,
77 Rue Lafayette, Rouen.

NOTO. Por pluajn sciigojn sin turni al: R. Ludoviko, internacia sekretario, 49 Rue de Bretagne, Paris; A. Mehlhorn, Leipzigia sekretario, Konradstr. 9/11, Leipzig-Neuschönefeld.
Baldaŭ aperos la nomaro de la diversaj sekcioj.

Post la lupoj, la hienoj aŭdigas sin.

La balkanreĝoj, kiuj jus oferis la vivon de dekmiloj el siaj popoloj kaj kiuj transdonis urbojn kaj vilaĝojn al detruo, por satigi la havemon de l' regantaj klasoj de siaj landoj — tiuj reĝoj ellasis post la paco de Bukurest Ŝvelajn, patosplenajn proklamajojn en kiuj ili bedaŭras la falintojn kaj laŭdas la revenantojn. Inter tiuj „dokumentoj” estas nur grava tiu de l' bulgara reĝo. Tiu reĝo deklaras, ke la tasko: „liberigi la samnacianojn”, plejparte malsukcesis, ke tiu tasko do devas esti reprenata tuj se okazo prezentos sin. „Niajn glorplenaĵojn standardojn ni nun devas rulvolvi — la glorplena laboro estos daŭrigata je alia tempo” . . . Ni esperu, ke intertempe inter la bulgaraj popolamasoj naskiĝu idealo pli alta ol tiu ĉi: esti unuigata kun samnacianoj. Tiaj antikvaj idealoj devas cedi lokon al nova idealo: unuiĝi kun samklasanoj, nacie kaj internacie, kontraŭ la samnacia kaj alinacia burĝaro.

SOCIA MOVADO.

El Anglujo.

Mez-Anglujo estas, pro moralaj kaj pejzaĝaj kialoj, nomita la nigra lando; ĉi tie daŭras striko de pli ol 30.000 laboristoj. Terurajn suferojn portas la virinoj kaj infanoj, la strikantoj en kvar sekcioj tramaršas nian landon, ili ĉie konduktais kunvenojn kaj ricevas monan he'pon kaj morale la kuraĝigon de la proletarioj. Vivu la solidareco, ĉiu fabrikejo estas fermita, kaj niaj samklasanoj certe venkos.

La edzino de k-do Hyndman, S.D.P., mortis post por socialismo plej aktiva vivo; ŝi estis enterigita per kamaradoj kaj bedaŭrantaj ruĝuloj, laŭ la ideo de progresemuloj.

La feministoj ankoraŭ estas aktivaj per bomboj kaj bruligoj. Viro imitis f-inon Davidson eĉ al la morto. La registro montras sian barbarecon per la uzado de la leĝo, popolare nomita „La Kata kaj la Musa leĝo”; oni liberigas la kondamniton kiam ŝi aŭ li preskaŭ malsatis ĝis morto, kaj kiam la malfeliĉulo estas resaniĝa, la policaro rearestas ilin kaj rejetas en la malliberejo.

Kompreneble, tiu metodo estas malrapida mortigo de la plej kuraĝaj el la gefeministoj.

HOYLE.

El Franclando.

Amnestio. — De la 18a de Februaro — tago en kiu ni havis nian novan prezidenton — la amnestio estis promesata.

La kondamnitoj politikaj — tio estas pri polemiko, mankoj de konformeco kun ideoj de niaj nunaj mastroj — devis esti la unue forgesitaj. Sed ve! la projekto tiom ofte estis diskutata de la deputitoj kaj senatanoj, kiuj, ĉiu laŭ sia opinio, forstrekis ion al si malagrablan, ke nur la kulpuloj je ĉaso, fiŝkarto dum nepermesita tempo, la laborestroj, kiuj ne respektis la protekton legan al siaj laboristoj, kaj kelkaj aliaj tiel estimindaj kulpuloj estis amnestataj.

Niaj kamaradoj, kulpaj je opinioj, restas en malliberejo; la ĉasistoj kaj labormastroj malrespektis la leĝon.

Niaj kamaradoj estis en leĝeco, ĉar estis dirite: Neniu estos malkvietigata pro siaj opinioj. Kaj ĉiuj civitanoj estas egalaj antaŭ la leĝo.

Tio estas vortoj per kiuj oni trompas la polon. For la leĝoj.

* * *

La militservado. — La 3-jara militsklaveco estas akceptita. Sed la efiko komenciĝos post 2 jaroj.

Nia ĉefministro diris antaŭ la voĉdonon: „la nunaj soldatoj restos unu jaron plue”, sed la ribeloj pripensigis lin, kaj li ne plu sciis kion fari.

Tamen, tiun jaron 2 klasoj — tio estas la junuloj havantaj 20 kaj 21 jarojn — estos alvokitaj.

La socialistoj petis, ke la riĉuloj pagu la novajn elspezojn.

Tiuj riĉuloj grimacas. Ili baldaŭ pagos. Ili estos pripensintaj, ke ili ne laboras, ke ili riĉiĝas per la ŝvito de sklavoj, ke nur tiuj kiuj laboras produktas la riĉajaron, kaj armeo gardas riĉulojn.

Ĉio estas profito!

A. PANLOU.

El Nederlando.

Holanda soc.-dem. partio devis decidi, dum la lastaj semajnoj, pri problemo, kiu en nenia lando sin ĝisnun prezentis en tiel konkreta formo antaŭ la partio. Nome pri la problemo de socialistaj ministroj.

Ses jaroj regadis en Nederlando la klerikaloj. En la komenco prudentaj kaj singardaj, ili farigis lasttempe pli kuraĝaj. Ili kredis, ke la tempo estis favora por efektivigi parton de sia programo: nuligo de la libera komerco (krom Anglujo ni estas la sola lando, kie la importado estas relative libera, t. e. sen limimpostoj), nuligo de la senreligia instruado, limigo de la preslibereco, plifortigo de la potenco de l' dinastio, plifortigo de militarismo k.t.p. k.t.p.

Nunjare estis ĝeneralaj elektoj. La batalo estis inter tri grupoj: 1. la klerikala koalicio de katolikoj, kalvinistoj, reformistoj, k.t.p.; 2. la liberala koncentriĝo; 3. la soc.-dem. partio. La liberaloj eniris la batalon kun iom malklara programo, la soc.-dem. sub la devizo: universala elektrajto kaj ŝtatpensiono por ĉiuj laboristoj.

Post la unua voĉdonado estis klare, ke la klerikaloj perdis la plejmulton, se liberaloj kaj socialistoj povus akordigi pri reciproka helpo ĉe la dua voĉdonon. La socialistaj partioj prezentis tiun helpon al ĉiuj liberaloj, kiuj deklaras, ke ili enkondukos universalan elektrajton kaj ŝtatpensionon. Ĉiuj liberaloj donis tiun deklaron. Kaj la fino estis, ke el la 100 mandatoj akiris: la klerikaloj 46 (perdis 13), liberaloj 38, socialistoj 16 (gajnis 9).

Neniu grupo do havas parlamentan plejmulton. La liberaloj

tiam diris: ni volas plenumi nian promeson pri elektrajto kaj pri ŝtatpensiono, sed ni deziras, ke en la nova ministraro socialistoj akceptos tri ministrofiujon.¹⁾

Oni konas la socialistan vidpunkton pri la ministra problemo. La bazo de tiu vidpunkto estas la rezolucioj de l' internaciaj kongresoj en Parizo (1900) kaj en Amsterdam (1904). Laŭ tiuj rezolucioj la soc.-dem. partio ne celadas al ministroficoj. Eniro de socialisto en burĝa registro ne estas rigardata kiel parta konkoko de l' ŝtatopotenco, kiu ne estas konkirebla parto post parto; ĉie kaj ĉiam tiun partiprenon oni devas, en ordinaraj cirkonstancoj, eviti kaj rifuzi. „Eniro de socialisto en burĝa ministraro ne estas normala komenco de konkoko de l' politika potenco; ĝi nur estas permesebla kiel lasta deviga solvo en escepta situacio. Kaj tiel danĝera provo nur povas tiam havi bonan rezulton por la socialistaj partioj, se ĝia tre granda parto ĝin aprobas kaj se la socialistaj ministre restos la mandathavanto de nedividita partio“.

En Holanda partio tuj formis sin du grupoj: la unu juĝis, ke escepta situacio, en la senco de l' pariza rezolucio, klare estis videbla; la alia grupo neis la ekziston de tia escepta situacio.

10an de Aŭg. en urbo Zwolle (kie en 1894 la holanda soc.-dem. estas fondita) kunvenis intertempa kongreso por decidi en tiu afero. Antaŭe ĝi jam estis ĉiuflanke priparolita en niaj soc. organoj.

La argumentoj de la poruloj estis jenaj. La rezolucio de Parizo konsentas, ke povas esti esceptoj en kiuj soc.-dem. povas akcepti ministroficojn. La soc.-dem. teoriistoj konsentas, ke la ebleco de konkoko de l' universala elektrajto povas krei tiun escepton. Nu, dum la lasta elektado ni propagandis precipe: universalan elektrajton kaj ŝtatpensionon. La laboristoj amase voĉdonis por ni, por fine vidi starigi tiujn du grandajn aferojn: universalan elektrajton kaj ŝtatpensionon. Tio estas nun ebla, se ni konsentas akcepti tri ministroficojn. Se ni ne faras tion, tiam venos nek universala elektrajto, nek ŝtatpensiono, ĉar la liberaloj pretekstas: ni ne havas plejmulton, kaj nur volas agi kun vi, se vi portos kun ni la respondecon. Se do la soc. rifuzos, ankaŭ la liberaloj rifuzos, gajaj, ke ili havas pretekston por rifuzi. Kaj la laboristoj diros: jen, se ni ne estus voĉdonintaj la socialistojn, sed la

1) En Holando la registraro estas ĉiam prenata el la plejmulto en la parlamento.

liberalojn, tiel ke tiuj lastaj havus plejmulton, tiam ni estus gajnintaj universalan voĉrajton kaj ŝtatpensionon. La laboristoj fidas nin. Ni devas respekti tiun fidon! Oni diras: ili ne estas socialistoj. Sed, ni batalas por la laboristoj unue, kaj ni ne povos fari el ili socialistoj, se ni por la intereso de socialismo malprizorgas la interesojn de la laboristoj. La afero de l' ministroficoj enhavas danĝerojn, sed por la bono de la laboristoj ni devas kontraŭstari tiujn danĝerojn. Socialismo ne estas artfaritajo, ĝi estas sufiĉe vivipova por povi kontraŭstari tiujn parlamentajn danĝerojn, ĉar ĝi kreskadas el la subtero de l' socio mem.

La argumentoj de la kontraŭuloj estis jenaj:

La liberaloj scias, ke ni ilin apogos, se ili volos plenumi sian promeson. Ili do povas, se ili volas. La fakteto, ke ili nepre deziras soc. ministrojn pruvas, ke ili serĉas eviti tiun plenumon, t. e. ke ili ne volas. Se ni akceptos, ili serĉos aliajn pretekston. Estas do treege necerta, ke nia akcepto alportos elektrajton kaj ŝtatpensionon. Kontraŭ tiu duba gajno staras la certaj malprofitoj de la situacio, ke soc. ministroj devos fari aŭ toleri kontraŭsocialistajn agojn. Nia partio, pro sia origino, sia karaktero, sia celo sin direktas kontraŭ la tutu estrado de l' burĝaro, kaj ni ne povas partopreni al burĝa estrado sen akcepti ĝian burĝan karakteron. Kaj se ni per tia grandega ofero akirius universalan elektrajton, tiam tre versajne estus inter la proletariaro granda malklareco kaj konfuzo, kaj ĝi ne estus en bona stato por profite manuzi la armilan tiumaniere akiritan. Ĉiu reformo unue devas pliheligi la klasokonscion de l' proletariaro. Ni devas nur tiam partopreni al la administrado de l' ŝtato, kiam la burĝoj ne plu kuraĝas tion prezenti al ni.

Post larĝa, ĉiuflanka diskutado la kongreso voĉdonis. Kun 375 voĉoj de delegitoj kontraŭ 320 la kongreso decidis *ne* akcepti la ministroficojn. Kaj la kongreso leviĝis, tondre kantis Internationale, kaj disiris por repreni la batalon kontraŭ la burĝaro.

W. N.

El Rusujo.

Medicina helpo en Siberiaj vilaĝoj. II. Nun mi priskribos la alian kuracistan regionon de nia Trans-Bajkalo, kie mi nun loĝas, en vilaĝo Sergolgin (inter 51°—50° kaj 77°—78° de meridiano), je distanco 150 kilometroj de urbo Kjahta (fama kiel tekomercejo inter Rusujo kaj

Ĉinujo), je 200 kilometroj de plej proksima servoja linio (stacidomo Petrovskij Zavod) kaj je 300 kilometroj de ĉevalveturo de urbo Verhneudinsk; apud la limo kun Mongolijo, inter montaroj arbaroj, inter rusoj kaj „burjataj”-nomadoj. La regiono de nia kuracisto (li loĝas en vilaĝo Krasnij Jar, 42 kilometroj de Ŝergolgin) estas tre vasta kaj havas logantaron apud 77 miloj da homoj. Do, por kelkaj dekmiloj da homoj estas unu kuracisto kun du helpantoj — unu ankaŭ en Krasnij Jar, la dua en vilaĝo Uriuk.

Nu, provu sukcese labori, des pli ke ekzistas nenie bonaj apotekoj nek malsanulejoj, nur du akceptejoj, kun unu aŭ du litoj. Ho, se oni en tiaj litoj kuŝigus niajn deputitojn de Regna Dumo kaj la sinjorojn membrojn de Regna Konsilantaro, kiuj kontrolas budĝeton de l' Regno, malavare donas monon por cara domo, por grandegaj salajroj kaj pensionoj de altrangaj oficistoj, guberniestroj, episkopoj; kiuj permesas elspezi milionojn da Sm. por vojaĝo kaj gardo de l' caro kaj liaj ministroj dum ilia triumfa promenado en Ruslando; kiuj lasas la teron en manoj de nobeluloj kaj riĉegaj terposedantoj, kiuj tiel bone aranĝas la vivon de rusa popolo, ke malgraŭ multlaboremo de rusa vilaĝano kaj riĉeco de l' tero, mankas greno por popolo, kiu malsategas, kiu infektiĝas, kiu bestiĝas, ebriĝas, dum despotoj festenas en belaj palacoj, sian timegon dronigante en vino.

Eble iuj ŝovinistoj, pseŭdopatriotoj, riproĉos min, ke pri Ŝtrumpo truo sciu nur la ŝuo, t. e. ke mi elportas la malpurajon el nia „domo” eksteren, tiam al tiuj „delikatuloj” kaj „patriotoj” mi respondas jenon: patrujo estas popolo; mia patrujo estas mia popolo: se mi amas popolon, tiam sekve mi amas patrujon, kaj sekve mi tiam estas patrioto; sed mi ankaŭ amas ne nur mian — rusian — popolon, sed ankaŭ ĉiujn aliajn, polojn, ĥinojn, burjatojn, finojn, anglojn, k.t.p.; sekve mi, amante mia popolon (t. e. patrujon), kaj amante ankaŭ la aliajn, mi ne permesas al mi deziri la feliĉon de mia popolo per malfeliĉo de la aliaj — sekve, mi, estante patrioto, estas je tiu ŝama tempo ankaŭ kosmopolito, ĉar laŭ Kristo kaj laŭ racio ĉiuj popoloj estas amikoj, gefratoj. Eble, doktrine, teorie, tio estas absurdajo kaj mallogikajo, ĉar laŭ akceptita ŝovinista opinio, patriotismo estas absoluta kontraŭaĵo de kosmopolitismo, sed mia sento pravigas min, mia racio kaj logiko pravigas min, mia Kristo kaj religio pravigas min — kaj

tio estas por mi sufiĉe, tute sufiĉe, kaj je aliaj konsideroj mi (pardonu mian maledikatecon) kraĉas.

Plue. Amante popolon, mi devas kontraŭbatali ĝiajn malamikojn; sed malamiko de mia popolo estas ne poloj, ne hungaroj, ne japanoj, ne kaŭkazanoj, ne iaj aliaj, sed tiuj, kiuj instruas min, ke poloj, finoj, japanoj kaj aliaj estas miaj malamikoj; kaj mi kaj vi bone scias, ke tiaj instruantoj estas niaj premigistoj: registoj, klerikaloj, nobeluloj kaj aliaj similaj, unuvorte la regantaj klasoj, la registro. Tial, registro kaj popolo estas malamikoj. Sekve, insultante registaron, mokante ĝin, mi insultas kaj mokas ne popolon: sekve mi ne estas nepatrioto, sed patrioto, ĉar mi defendas miajn popolojn de liaj malamikoj. Sed, amante miajn popolojn, mi deziras ke ĝi estu feliĉa per feliĉo de ĉiuj aliaj popoloj, t. e. ke mi estas ne nur patrioto, sed kosmopolito.

Pastro SERIÈV.

El Usono.

La silkteksistoj en Paterson, N. J., perdis la strikon, kiun ili tiei kuraĝe bataladis 5 monatojn. La perdikaŭo estis precipite la malsato kaj ĉar nur 5000 el la 25000 strikantoj estis anoj de la I. W. W. La monhelpo por tiu longtempa striko ne povis sufiĉi kaj la nombro de kontraŭuloj estis supersufiĉa ĉar, krom la kapitalistoj kun iliaj gardhundoj, la policistaĉoj, ankaŭ la nacia amerika federacio de l' laboro ĝin kontraŭis. Ĉar la Usonanoj kontraŭas la teoriojn de la senpera agado kaj la sabotadon, kiujn la sindikatistoj tiel favoras, tiu striko nek havis la simption ankaŭ de la Nov-Jorkaj socialdemokrataj politikuloj kun iliaj gazetoj. Kvankam mankis la kunhelpo de tiuj, la I. W. W. grandiĝas kaj estas gajnonta ĉie inter la proletariaro. Kvankam tiu striko estas perdetita, io estas gajnita: la solidareco, ĉar 18000 el 25000 strikantoj staris kuraĝe je la striko ĝis la malsatego ilin pelis repreni laborojn.

La I. W. W. ricevis gaston el Anglujo, k-don Tom Mann, kiu paroladis en la kunveno en Nov-Jorko, la 3an de Aŭgusto, antaŭ kelk-miloj da laboristoj. Mann, fervora, radikale pensanta sindikatisto, paroladis interese kaj konvinke, pri la laboristaj aferoj en Anglujo, Aŭstralio, Sudafriko kaj Germanujo. Kvankam sesdekjarulo, li angle paroladis verve, altvoĉe kaj gestade kiel suditalano kaj tio helpis multe lin kompreni ankaŭ de ne anglaj homoj. Mann rekomendis al ni kunhelpi la I. W. W. sub Bill Haywood. Li parolados en kelkaj usonaj urboj.

Meze de Julio estis en vivo alia granda striko de la 163000 fervoistoj, servantaj 48 orientajn fervojajn kompaniojn; sed la afero estis aranĝata antaŭ la politikuloj en Washington, tial la grava striko ne okazis.

En Nov-Jorko nuntempe strikas la pluvmantelfaristoj, la lavisthelpantoj kaj la trikistoj, kiuj havas la helpon de la juda laborista unuiĝo, kaj ŝajnas ke ĉiu el ili gajnos ion.

Granda skandalo okazis en Seattle, Wash., kie la ministro de la usona maristaro, Daniels, paroladis publike, kaj diris, ke la ruĝa standardo estas la malamiko de ĉi tiu lando kaj ke por ĝi ne estas loko ie. Tial la proksiman vesperon kelkaj ebriaj maristoj kuraĝigis kaj atakis la ruĝan standardon sur la stratangulo, kie paroladis socialisto, poste penetris perforte en la oficejo de la I. W. W. kaj de la socialista partio, dissirante kaj rompante ĉion. En ilia soldato aŭ patriota ebrieo ili pasis ĉe la oficejo de la Salvation-Army, iu sankta armeo da piuloj, kaj malkonscie ankaŭ tie penetris, pecigante ĉion, kion ili trovis, ĝis fine ili rimarkis kelkajn bildetojn surskribitajn kun sanktaj sentencoj el la biblio kaj tial forkuris al la ŝipoj, bedaŭrante, ke ili faris tian blasfeman eraron. — Nun la socialistoj sendis gravan proteston al la registro, sed neniu ĝis nun scias la respondon de la registro.

Je brulado de la fabrikejo por infanaj vestoj en Binghampton, N.-J., 65 laboristinoj perdis la vivon en fajro. Tio ankaŭ okazis antaŭ 3 jaroj en Nov-Jorko, kie la Triangula tolfabrikejo elbruliĝis je perdo de 143 homaj vivoj, kaj la fabrikestroj, kvankam kulpaj por la malsavo de la vivoj, estis senkuligitaj de la juĝistoj; la sama okazos ĉe tio brulado; nur tie ĉi en ŝtato Nov-Jorko ekzistas nova metodo de la politiko. La regnestro Sulzer kontraŭas la plej potencan politikulon Murphy kaj faras lin responde pri la nuna brulado, ĉar li ne atentis laborinspekton. Sed tio estas politika friponajo kaj ree neniu de la vunditaj survivantoj de tiu fajro aŭ la suferantaj patrinoj de la perditaj infanoj ricevos eĉ unu spesmilon por ĉi tiu neresponsa perdo de homaj vivoj. — Nun la politikestro Murphy akuzas la regnestreron Sulzer por subaĉeteco kaj trompa ŝelaĵo. Ni radikaloj scias bone, ke ĉiu iliaj burĝaj politikuloj estas subaĉeteblaj kaj eĉ ete ne miras se ili estas devigitaj puni la polican leŭtenanton Becker je morto kaj multajn aliajn policistojn eĉ senatoron Stillwell por subaĉetado. Ne nur en ŝtato de Nov-Jorko ili komencis trovi friponajn ankaŭ en ŝtato de Illinois okazis subaĉetadoj

inter la politikuloj, kaj tiu ŝtato ŝajnas esti finance bankrota.

En San Francisko, Cal., la Ferrara moderna lernejo enkondukis Esperanton sub instruado de samideano H. L. Gorham.

KLAJIN.

Mensoga Paco.

De D-ro C. Racovski, trad. de Em. I. Nicolaŭ el rumana soc.-dem. organo „Laborista Rumanuo”.

En la momento kiam ĉi-tiu linioj aperos, la paco estos, kredeble, subskribita de la interdisputantoj. La ega plifacilajo, kiun tiu ĉi okazajo alportos al la balkanpopoloj, ombriĝas, kiam ni pensas al estonteco.

Ĉiu sin demandas: kiom da tempo daŭros tiu ĉi paco? Neniu faras al si iluziojn; la paco de Bukureŝti estas mensoga paco, ĝiaj kondiĉoj estas ĝermoj de estontaj militoj.

La filozofoj povas verki, kiel faris Kant. volumojn pri eterna paco. Sed tio ĉi restas kaj restos utopio en societo, bazita sur la klasa milito; en societo, kies legoj estas: ekspluatado kaj rabado. Estas absurde atendi, ke la rilatoj inter la popoloj sin basu sur la respekteto de la individuaj kaj opaj rajtoj, se la rilatoj en la interno de ĉiu popolo estas fonditaj sur maljustajo, kaj se la egaj malmultoj, sed fortaj sur militarismo, altrudas sian tiranecon al la tutaj laborista popoloj. El tia societo, kvazaŭ el marĉaj akvoj, elleviĝas la militaj miasmoj.

La nuna paco, skribita per la pinto de l' glavo, ne atendas ol alian glavon pli akran por ĝin disrompi.

Kaj tio ĉi des pli vere, ju pli ĝi ne entenas eĉ tiun minimumon de socia kaj morala ekvilibro, kiu estas la nepra kondiĉo de la daŭrebleco tre relativa, kiun havas la rilatoj inter la popoloj en la burĝa socio.

La nuna balkana ekvilibro, tiel kiel ĝi rezultis el la traktadoj de Londono kaj Bukureŝto, havas ĉe siaj bazoj vulkanajn fortotojn, kiuj minacas ĉiam eksplodi kaj ĝin detru.

En la unua vico ĝi estas malefika al la interesoj de l' turka popolo. Estas vere, ke la reinstaligo de la turkoj en Adrianoplo estas nenia pruvo de viveco kaj nenia provo de militista supereco. Parolante pri Turkujo speciale, tiu ĉi ago povas esti komparata kun tiu de mortanto, kiu konservas ankoraŭ kelkajn momentojn la refleksajn movojn. Sed se eĉ ni supozos, ke Turkujo tute malaperos kiel ŝtato, tiam la

turka popolo tamen daŭros ekzistadi. En ĝia spirito, maltrankviligita per tiom da teruraj rememorajoj, en ĝia vundita animo pro la humilajoj, maljustajoj kaj senekzemplaj barbaraj, faritaj en la nomo de l' kruco, bolos la sento de ribelo kaj la sento de revenĝo. Kaj tiuj ĉi milionoj da turkoj, certe, iam reviĝos je nacia konscio, kaj iam profitos la mal-harmonion de la fama balkana ekvilibro. Kaj se Turkujo restas ankoraŭ kiel nacia ŝtato, tiam ĝia kontraŭa milito povas esti multe pli proksima ol ni pensas. Kaj hodiaŭ oni ne scias, ĉu la Turkoj, sen nova milito, estos forpelataj el Adrianoplo, kiu apartenas al ili. Iau ĉiuj etnikaj rajtoj kaj kiun la bulgaroj postulas, sur la bazo de rajtoj de konkiero.

Sed, ĉu oni povas paroli pri longdaŭra ekvilibro inter la kristanaj balkanaj ŝtatoj? Tute ne! En la rilatoj, kiuj stariĝis tie ĉi, oni forigis ĝuste la justecon. En Bukuresto triumfis la egoismo, la falseco. Rumanuo forprenas el la korpo de Bulgarujo teritorion de ĝi, teritorion de 7500 kv. Km. kun 305000 loĝantoj, inter kiuj, duono estas bulgaroj kaj duono turkoj, kaj nur 7500 rumanoj.

Kia justa kaj honesta konscio povas sen ribelsento toleri tiun forrabon, tiun ĉi „verkon de l' kugloj”!

Ni scias, ke en nia gazetaro oni spekulacias multe la bonvolecon de la bulgaroj en la cedo de la teritorio.

La bonvoleco de l' homo kun manoj kaj piedoj enkatenigitaj, kiu donas al iu sian monujon por savi la nudan vivon!

Sed kiu povas fari al si iuuziojn, ke iam la konscio de l' popolo pardonos al ni tiun ĉi forprenon de ĝiaj rajtoj! Kaj kiu povas esti tiel naiva por ne antaŭvidi en tiu ĉi situacio la ĝermon de estonta milito inter ni kaj Bulgarujo?

Se, de la nordo de l' Balkana duoninsulo ni iras suden apud la maro Egea, ni vidas tie, kie apenaŭ ia nuna milito finigis, prepari sin la estonta milito.

Se la registroj estus volontaj, tiam inter grekoj kaj bulgaroj facile estus stariĝinta interkonsento. En Sud-Makedonio pasos sub la regado de la grekoj 150.000—200.000 bulgaroj. En Trakio okazas la malo. Se ambaŭ registroj estus garantita al ili instruan kaj religian aŭtonomion por la elementoj alirasaj, tiam ili povus facile starigi ekvilibron kaj reciprokan tolerecon. Sed la ambaŭ ŝtatoj estas kaptitaj de la febro de l' imperiismo. La Grekoj prirevas la regadon de l' bordo Trakia, la Bulgaroj de l' bordo Makedonia.

Kaj tiu ĉi imperiismo ne datumas de hodiaŭ aŭ de hieraŭ. Ĝi estas malnova ĉe unuj kiel ambaŭ ĉe aliaj. La greka

oligarhio havis kune kun Turkujo longatempe la regadon de l' bakanaj popoloj. Oni scias, ke ĝis jaro 1862 Bulgario ne havis proprajn lernejojn, nek proprajn preĝejojn. La edukado de l' infanoj kaj la havajo de l' preĝejoj troviĝis en la manojo de la greka klerikala oligarhio, kiu, cetere, etendis en certaj okazoj sian regadon ambaŭ ĝis ĉe ni, lando, kie ĝi posedis vastajn bienojn.

Aliparte, la greka negocista burĝaro kaptis la tutan komercon sur la turka bordo de l' maro Egea kaj Nigra. La etendiĝ-povo de ĉi tiu burĝaro estis tiel granda, ke ĝi povis stariĝi ambaŭ sur la rusa marbordo ĉe Odessa kaj Batum kaj sur la Adriatika marbordo ĝis Marseille, kie ambaŭ la grekaj komercistoj nun havas kolonion.

Samtempe kun la komerco, en la manojn de la greka burĝaro pasis ambaŭ la monprunktmetio, la procentsuĉado. De la marbordo ĝi etendiĝis en la internon de l' landoj. Ĝi penetris en la plej malgrandajn urbojn de Makedonio kaj Trakio, lasante la vilaĝojn al la turka, bulgara, arumana¹⁾ aŭ albana agrikultura elemento.

La greka klerikularo, kune kun la negocista burĝaro, estis la antaŭirantoj de la greka imperiismo.

La vilaĝa loĝantaro ne estante gajnebla, oni klopodis grekigi la fremdajn elementojn.

Nutrita per tiaj ideoj de grandeco, Grekujo despli facile povas iĝi ilo en la batalo por supereco inter la duobla kaj triobla alianco.

Dum Aŭstrujo kaj Italuo helpas la Bulgarojn sur la Egea marbordo, Francujo helpas la Grekojn. Kaj tiu ĉi mara antagonismo inter la ambaŭ balkanaj ŝtatoj kaſas en si la dangeron de nova milito.

Sed la vera sorĉojo, el kiu eligos ambaŭ estonte la plej multaj ventegoj por la burĝaro, estas Makedonio kaj Albanio.

La ŝtato, kiu kreigis tie, estas portanto de la plej teruraj internaj kaj eksteraj luktoj.

Individuaj venĝoj, amasaj venĝoj, atenco, ribelo, milito, jen kio atendas la malfeliĉajn loĝantojn, precipe de Makedonio.

LA BULGARA IMPERIISMO.

La bulgara politiko en Makedonio estis krimula kaj detruiga politiko por la loĝantaro bulgara-makedonia. Sekvinte bone tiun ĉi politikon dum dekkvin jaroj, studinte ĝiajn rezultojn

1) Arumano = Rumano el Makedonio.

dum miaj ripetitaj vojaĝoj en Makedonio, mi povus montri tie ĉi per sennombraj faktoj, kiom danĝera estas por la popoloj la naciismo militema.

Tiu ĉi priskribon mi faros iam. Nun mi volas nur limigi la tendencojn kaj la rezultojn de tiu ĉi politiko.

La celo de Bulgarujo estis la aneksigon de Makedonio. La bulgara registaro defendis la interesojn de la Makedonia-bulgara loĝantaro nur tiom, kiom tiu ĉi defendo konkordis kun la celoj de la Sofia politiko. Kiam la interesoj de la loĝantaro en Makedonio estis kontraŭaj al tiu celo, ili estis forlasitaj sen la plej malgranda kompato.

Ni alportas tie ĉi du faktojn, kiuj krude lumigos la procedojn de la bulgara registaro.

Dum la jaroj 1903—1908 la bulgara ekzarhato¹⁾ — tiu ĉi fakto estis al mi komunikata de la plej alta bulgara eklezia aŭtoritato — petegis la aprobon de Bulgarujo por starigo de bulgara agrikultura banko por aĉetado de bienoj kaj proprajoj en Makedonio kaj ilin dividi inter la bulgaraj kampanaroj. Tion ĉi oni povis fari tre facile, ĉar la grandaj bienposedantoj — tielnomataj *begj* — estis forlasintaj siajn proprajojn pro la ribeloj kaj ili volente vendus la terenojn el kiuj ili ne plu eltiris profiton. Sed la bulgara registaro kiel ankaŭ la makedonia revolucia komitato rifuzis tiun ĉi helpon, ĉar: se la bulgaraj kampanaroj el Makedonio ricevis teron, ili ne plu estus varbeblaj por la bandoj de insurĝentoj! La dua fakto estas la sistema iukto de oficiala Bulgarujo por kaŭzi malkontenton pri la régimo juna-turka en Makedonio, por pruvi tiel la senkapablecon de reformita Turkjo.

Tiu ĉi registro pruvis, kion mi certigis ĉiam, nome, ke la idealo por la unueco de la bulgara popolo transformiĝis en la spirito de la bulgara burgaro en idealon por divido de la otomana teritorio.

Al Bulgarujo, frandema por teritorio, konvenis pli bone forpreni parton el la makedonia teritorio, forlasante la reston, k un loĝantaro bulgara, al la serboj kaj grekoj, ol forlasi la konkiritajn teritoriojn kaj postuli la aŭtonomion de Makedonio.

La detruigaj rezultoj por la bulgara popolo de tiu ĉi politiko vidiĝas: la tuta bulgara loĝantaro el Makedonio pasis sub fremdan regadon. — Du nomoj estas kaj restos kiel tragedia simbolo por la krimula politiko de la kondukantaj

1) Pregeja aŭtoritato.

klasoj en Bulgarujo. Mi parolas pri Kočana kaj Ištsp, kiuj pasas nun sub la Serboj.

Oni scias, ke la klasika procedo de Bulgarujo por la dekreditigo de la turka régimo, estis jene: ekscliti per iu atenco la turkan fanatismon kaj poste, kiam el tio rezultis masakro, ĝi apelaciis al la eŭropa publika opinio kontraŭ la turkaj barbaroj.

Similaj atencoj, sekvitaj de teruraj masakroj, estis farataj dum 1911 unue en Ištsp kaj poste en Kočana. Pli ol 300 da kamparanoj bulgaraj-makedoniaj estis bučata de la turka amaso.

Ni lasas al la bulgara popolo postuli konton de siaj krimulaj registoj, kiuj provokis la senpopoligon de Makedonio. Depost la ribelo de 1902 ĝis 1908 falis 30.000 makedoniaj-bulgaroj, alia parto de la loĝantaro forkuris por liberigi de la terorismo de la bandoj kiel ankaŭ de la turka militistaro. Ni lasas al la bulgara popolo postuli konton de sia oligarhio, kiu pereigis en la lastaj militoj en Turkjo kaj Makodonio proksimume 200.000 homojn, pro kugloj, gangreno, tifa febro kaj holero, dum dekmiloj restos invalidaj por la tuta vivo. Mi lasas al la bulgara popolo postuli konton de ĝiaj registoj, kiuj elartikigis la bulgatan nacion, disdividante ĝiajn partojn inter la rumana, serba kaj greka oligarhioj.

Sed, oni ne devas supozi, ke similaj faktoj forpasas sen konsekvencoj por tiuj, kiuj profitas de ili. Makedonio povas esti la tombo de Serbujo, same kiel la Kvarflanklando²⁾ povas montriĝi morgaŭ tro granda por enteni nian (rumanan) kadavron.

LA SERBA IMPERIISMO.

En la „Socia Estoonto”²⁾ mi montris, por kiaj motivoj niaj (rumanaj) imperiistoj sentis specialan simpation por la serba imperiismo kaj komencis per sia plumpinto desegni strategiajn landlimojn inter Bulgarujo kaj Serbujo sur la sanga konto de la Makedonianoj.

Aŭstrio kaj Rusujo forprenis al Rumanujo kaj Serbujo ĉiun eblon por etendiĝi norden, kie troviĝas iliaj samnacianoj. Estis do laŭ la logiko de l' aferoj sub kapitalista régimo: klopodi etendiĝi en la direkto de malplej forta rezisto, t.e.

1) La parto de teritorio forprenita de Rumanujo, nomata france quadrilatère, ĉar ĝia konturo havas la figuron de kvarflanka geometria figuro.

2) Socialista revuo rumana.

suden, sur la konto de l' nacio bulgara. Laü la etnika vidpunkto la serba imperiismo estas tiel same malmulte pravigita kiel la rumana.

Tiom da Rumanjo ekzistas en la Kvarflanklando, same tiel proporsia estas ankaü la nombo de la Serboj en Makedonio.

La ciferoj el diversaj fontoj konkordas tiurilate.

Laü la oficiala turka statistiko en 16 subdistriktoj okupitaj de serboj, estas 467.012 bulgaroj; sed serboj, aü pli ĝuste serbigitoj, nur 49.224. En folietono titolita „Tri tagoj en Uskjub” kaj publikita en „Radnicke Novine”, serba kamarado, deputito Liapćević, montras ke el la tuta loĝantaro da 58.000 de Uskjub, estas 30.000 turkoj kaj albanoj. Sed nek tiu ĉi cifero estas vera, kion k-do Liapćević mem rimarkas, skribante: la cifero de 30.000 estis al mi donita de serboj, kaj laü la aliaj ne tion atingas.

Cetero, ĝis antaü tridek jaroj, en la serba literaturo oni ne parolis pri serboj en Makedonio.

Irinte Belgradon fari esploron pri la agado de Sava Racovski kaj trafolumante malnovajn serbajn gazetojn, mi trovis ion priskribitan pri la slavoj en Makedonio kiel pri bulgaroj.

Tamen, la serba registro faris jam de tiem planojn de konkiero ne nur de Makedonio, sed ankaü de Bulgarujo.

Gi provokis ĉiam ribelajn movadojn apud la najbara landlimo, kiel estis apud Vidin. Gi postulis de la greka patriarkio, ke li rekonu kiel dependajn de la serba preĝejo, ne nur la episkopejon de Ištip sed ankaü tiun pure bulgaran de Ohrida. Gi penetris pere de la itala registro en sekretaj traktadoj kun Grekujo por la divido de la bulgaraj provincoj.

Tiu ĉi fakteto kiu okazis dum 1862 estas tial des pli karakteriza, ĉar en la momento kiam Serbujo faris projektojn por dividi la bulgarojn, ili (bulgaroj) helpis ilin kontraŭ la turkoj. Interesajn deklarojn faris tiurilate, la konata migranto kaj revoluciulo itala Marco Antonio, en libro titolita „Souvenirs d'Exil” (ekzilmemorajoj) aperinta dum 1868 en Parizo kaj kiun mi povis konsulti dank' al afableco de nia politika kontraŭulo s-ro N. Iorga.¹⁾

Jen kion skribis Antonio:

„La bulgaroj venis helpi siajn fratojn, serbojn, kaj formis organizitan korpuson sub la komando de Racovski. Ili estis

1) La estro de la naciista kaj antisemita movado.

forgesintaj sian malnovan malšaton kaj ĉian antagonismon. Sed mi konis la traktadojn, kiuj ekzistis inter la reĝo Othon kaj la serba princo Mihaelo, por fari el Balkanoj la sudan limon inter la suda Slavujo kaj Elada kaj kiu dividis Bulgarujo en du partojn. Kompreneble, ke mi detenis min diskonigi en tiu ĉi momento tiun ĉi projekton”.

Fino en la proks. no.

Grava!

La 27an de Septembro 1913a en London okazos la unua internacia kongreso de sindikalistaj fakunuiĝfederacioj. Pere de la Nacia Federacio de Konstrulaboristoj en Nederlando aperos sur la tagordo punkto favore al Esperanto.

Ĉiuj ligoj Esp. kaj grupoj do scias kion ili devas fari por instigi la kongreson.

Korespondadreso estas: Guy Bowman, 4 Maude Terrace, Walthamstow, London E, Anglujo. K-do Hoyle eble prizorgos la raporton de la rezultatoj, ĉu ne?

Mi nur bedaŭras, ke ankoraŭ ne ekzistas nia internacia organizajo de laboristaj esperantistoj, ĉar en tiu okazo ĝi bone povus propagandigi.

K. H. M., sekr. N. F. d. L. E.

Pri tradukado el I.S.R.

De tempo al tempo redakcio ricevas demandon, ĉu estas permesate traduki tiun aü tiun artikolon el I.S.R. Redakcio ne dubas, ke ĝi esprimas la opinion de ĉiuj kunlaborantoj al I.S.R., se ĝi deklaras, ke la tuta enhavo de ĉiu numero de I.S.R. estas je libera kaj senkondiĉa dispono de ĉiu, kaj ke oni do povas laŭ plaĉo el ĝi traduki ĉion, kion oni deziras.

KORESPONDADO.

Hispanujo: K-do Viktor Lluis, strato Eden 9, San Feliu de Guixols (Gerona), dez. kor. kun ĉiulandaj gek-doj per il. pk., leteroj ktp. — K-do J. del Rincon, San Mamas. Bilbao, dez. kor.

Rusujo: En Siberajn dezertojn ekzilita k-do Anton Seilus. Robinskoe p. std. Perowskoj Volosti, Eniseisk gub. der Innoker-tjevskaja, polit. ssoln., petas seriozan kor. kun k-doj revoluciuloj.

Nederlando: K-do A. de Vries, Koestraat 3b, Am-

sterdam, precipe kun amerikaj tipografiistoj. — K-do F. Faulhaber, Borgerstraat 103, Amsterdam, pošt-karte kaj letere.

Germanujo : K-do F. Richter, Auss H. Zorbigerstrasse 37 part., Bitterfeld, dez. kor. kun gek-doj en ĉiuj landoj; ĉiam respondos. — K-do Karl Rauschenbach, Annenstr. 7, Bitterfeld, kaj Richard Biebach, Roterbrücke Rein 5, Bitterfeld; ambau dez. kor. per il. pk. kun ĉiuj landoj; sincera propono. — K-do Hermann Goth, Blücherstr. 4, Treuen i. Vogtland, dez. interŝanĝi koloritajn p.k. kaj gazetojn; ĉiam respondos. — K-do Karl Richey, An der Haupkirche 3, Wolfenbüttel, dez. kor. kun gek-doj en ĉiuj landoj; same k-do Fritz Crohm, Kaiserplatz 11, Wolfenbüttel. — K-do Hans Düffels, Untere Königstr. 79, I, Cassel, dez. kor. per il. pk.

BIBLIOGRAFIO. — „Universala Unuiĝo“, revuo por humana unuiĝo en ĉiuj formoj de la penso kaj agoj (ne periodika), Vol. I, 1913; kvinlingve. Eld. N. Sejerman, Lubotin, Harkova gub, Rusujo. Prezo 0.670 Sm.

„Patreco“, 4-akta socia dramo (ludit dum Berna kongreso), esp. de M. kaj J. Wolf; Librejo Hachette, 79 Bd. St.-Germain, Paris; prezo Sm. 0.500.

„Praha“, ilustrita monografio, de D-ro J. Bělohlav; ĉe la aŭtoro en Praho-Vinohrady, Bohemio; prezo Sm. 0.500.

NIAJ KALKULOJ. — En kaso la 28an de Junio 140.61 guld. Ni ricevis: en Parizo (junio—julio), en frankoj: Cassin 4.60, Salabelle 2.50, Rouge 2.70, Sechet 1.25, Alombert 2.50, Rolin 2, Faure 1.25, Pérucho 2.50, „Liberiga Stelo“ en Lyon 14, J. Habert 2.50, R. Habert 2.50, Lécuru 2.50, Paulet 10.70; vendo ponumera 0.20, kune 51.70 = 25.35 guld. En Amsterdam (julio—20 Aŭgusto): Duce 5.10, Meijer 13.44, Wandsworth 1.15, Fleschütz 19, Vellozo 7.40, Lenger 2.30, Goll 1.19, Herold 3, Denis (Limoges) 2.35, Nyezchleba 1.21, Zimmermann 2.75, Rebouillon (Marseille) 3.33, Wandert 3.54, Jean Roth 3.60, Regan 2.20, Kraml 2.52, Frimberger 1.29, kune 76.99; entute 242.95 guld.

Eispezoj: en Parizo: sendo, kor. kaj diversaj fr. 3.30 = guld. 1.63. Preso de la 9a kaj 10a numero, sendo, korespondo ktp. 138.50 guld.; kune 140.13 guld.

Enspezoj . . .	242.96	guld.
Eispezoj . . .	140.13	"
En kaso . . .	102.82	guld.